15 JULIO 1908 Unu Numero : 10 CENTIMOJ (4 Spesdekoj) KVARA JARO. – Nº 35

★ ESPERANTO ★

OFICIALA ORGANO DE LA UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Duonmonata Internacia Gazeto

ABONO

Unu Jaro . . . . Sm. **1.20** | Helpabono . . . . Sm. **4.**—

Spesmilo (Sm.) = 100 Spesdekoj (Sd.) = 2,50 frankoj = 2 ŝilingoj = 2 markoj = 1/2 dolaro = 1 rublo = 2,40 kronoj aŭstr = 1,80 kronoj Skand (proksimume).

Oni abonas ĉe la Administrejo
8, Rue Bovy-Lysberg, 8, Genève (Svisujo)
aŭ ĉe la lokaj agentoj

DIREKTORO :
HECTOR HODLER
8, Rue Bovy-Lysberg, 8
Genève (Svisujo)

REKLAMO

1 paĝo	Sm. **100**—	1/4 kolono . . .	Sm.	**7.**—
1 kolono	» **25.**—	1/8 »	»	**4.**—
1/2 »	» **13.**—	1/16 »	»	**2.50**

25 % por 12 anoncoj ; 50 % por 24 anoncoj

Ĝeneralaj Agentoj : G. Warnier, 15, Rue Montmartre **Paris-2e**
C. A. G. Browne, 53, Wych Street, **London W. C.**

Por la Kongreso

Ĉiujare la atento de la Esperantistaro koncentriĝas al la Kongreso, kiu glore kronas la dumjaran agadon de ĉiuj samideanoj. Paroli pri la utileco kaj la neceseco de niaj kongresoj fariĝis nun tute superflua. Ili estas unuparte klara pruvo de la praktikeco de nia lingvo, kaj aliparte grandioza manifesto de la ideo, kiun en si havas Esperantismo. Al ĉiuj partoprenintoj la pasintaj kongresoj postelasis neforgeseblajn rememorojn, ne nur ĉar ili fortikigis ĉe ili tiun konvinkon, ke Esperanto en sia nuna formo tute kontentige taŭgas por sia celo laŭ ĉiuj vidpunktoj, sed ankaŭ kaj ĉefe, ĉar ili konkretigis tiun solidarecon, kiu tra ĉiuj tempoj kaj danĝeroj, kunligis la Esperantistojn kaj ilin alte levis super la detalaj kaj pasemaj malkonsentoj.

Tiun ĉi jaron, ankoraŭ pli ol la antaŭaj, nia Kongreso prezentas nekontesteblan gravecon. En la daŭro de la lastaj monatoj, Esperanto estis atakita de danĝero, kiun ĝi venke preterpasis. La homoj, kiuj en mallumo agitadis kaj trompadis por subdetrui la kolektivan kaj senprofitan laboradon de la Esperantistaro, estis devigataj forĵeti sian maskon kaj eliri pli malpli vole el niaj vicoj ; la homoj, ĉe kiuj Esperanto estas nur amuzilo por diletantoj kaj instrumento por konstanta pridiskutado kaj babilado, ilin ankaŭ forlasis, aŭ se ili tiel ne ankoraŭ agis, ili ĝin faru sentime. Sed la densa aro de tiuj, kiuj vere laboras por Esperanto, ĉiutage plidikiĝis kaj pliprosperiĝis. Nia movado, en rilato praktika, posedas nun internacian organizajon kun preciza plano de agado, kiu ne trudante ion al iu, ebligas konstantan disvastiĝon de nia afero en la uzadon praktikan kaj utiligadon de ĉiuj ĝis tiam tro dissemitaj fortoj de la Esperantistoj. La situacio do estas klara kaj kuraĝiga por la estonteco ; ĝi estos ĉefe klara, se la Esperantistoj multope veturas al la Kongreso, kiu al la mondo montros la novan antaŭenpaŝon faritan de post unu jaro. Niaj legantoj jam eksciis, kiel ĉio en Dresdeno estas bonege preparita. Festoj, teatra prezentado de « Ifigenio » en ĝia mirinda traduko, ekskursoj, oficialaj akceptoj, laboroj, nenio mankos por la plezurigo de la kongresanoj. Plie, dank'al la Universala Esperanto-Asocio, diversaj araj vojaĝoj estas organizitaj por faciligi la veturadon de ĉiuj samideanoj al la kongresurbo, ĉu igante la prezojn malpli karaj, ĉu helpante al la vojaĝantoj por la dumvojaj vizitindaĵoj. Tiamaniere, ĉiuj havos unikan okazon trapasi kaj viziti gravajn urbojn kaj regionojn, en plej bonaj kondiĉoj, sen la kutimaj malhelpoj, kiujn naskas vojaĝo tra fremdlingva lando. Neniu do ŝanceliĝu, eĉ mallongan momenton. Kiu havas kelkajn liberajn tagojn aŭ sukcesis rabi iom da libera tempo sin pretigu de nun al la Dresdena Kongreso kaj varbu aliĝantojn por ĝi. Se oni tion ne ankoraŭ faris, oni sendu sian aliĝon kaj enskribu sin por unu el la araj vojaĝoj de U. E. A. La multenombreco de la kongresanoj estas nepra kondiĉo de sukceso, oni tion ne forgesu. Ni ĉiuj faru nian devon, kaj Dresdeno estos nova decidiga triumfo — triumfo de Esperanto kiel lingvo, triumfo de Esperantismo kiel movado, glora rekompenco al tiu kreskanta armeo, kiu, senfanfarone, ĉiutage laboras por la atingo de sia celo.

H. H.

* * *

TRA LA MONDO

GRANDA BRITUJO

Londono, Junio 1908

De la 12a. la Londonaj stratoj — kutime pli trankvilaj ol la plej malgranda vilaĝo — estis plenaj je scivoluloj, sin direktantaj al la kunvenejoj elektitaj de la voĉdemandistinoj por organizi sian grandan marŝadon al Hyde Park. Baldaŭ kolektiĝis kelkaj miloj da ili alvenintaj el ĉiuj partoj de Granda Britujo, kaj eĉ el diversaj fremdaj landoj ; inter du baroj de vidantoj pli malpli mokemaj ili fiere iras al la loko, speciale rizervita por ili. Ĉiuj portas la insignojn de la nova politika asocio kaj multaj junulinoj havas eĉ specialajn ĉapelojn kun la trikoloraj rubandoj : purpura, blanka, verda, surskribitaj per dikaj literoj « Voĉoj por virinoj ». Neniam en Londono, eĉ en tuta Britujo, simila elmontraĵo estis vidita ; ĝi estis ununura kaj sen antaŭaĵo laŭ ĉiuj vidpunktoj. Efektive, ĝi estis organizita kaj direktita nur de virinoj, kaj nur virinoj devis paroladi. Ne malpli ol okdek parolantinoj okupis dudek estradojn, nombro neniam atingita eĉ en la plej grandaj popolaj elmontraĵoj. La ĉeestantaro ankaŭ tute malsimilis kaj nombre superis la ĉiudimanĉajn kunvenojn de Hyde Park. Pli ol 300,000 viroj kaj virinoj aŭskultis silente kaj atente la vere interesajn argumentojn de la voĉdemandistinoj. Nur kelkaj sentaŭguloj deziris, kiel ĉiam, montri sian mankon da edukiteco kaj ekaŭdigis kriojn indajn de bestoj aŭ sovaĝuloj ; sed ili estis baldaŭ devigataj silenti, ĉar la policano kaj la vira aŭskultantaro subtenis la voĉdemandistinon kontraŭ tiuj malamikoj pli malspritaj ol malbonaj. Alia notindaĵo de tiu neforgesebla tago por feministoj estos la unuiĝo de ĉiurangaj kaj profesiaj virinoj ; kune batalas laboristinoj kaj riĉulinoj kaj ili timas nenion, laŭ oni povis konstati per la standardaj devizoj. Inter tiuj 3.000 ni nur citu la multegajn : « Voĉoj por virinoj ; Egaleco por viroj kaj virinoj ; Sankta estas nia kaŭzo, fidu nian standardon ; La estonto al la gelaboristoj ; La instruistinoj postulas voĉrajton ; Voĉojn bezonas flegistinoj ; Unu virino, unu voĉo ; kaj fine, 237 malliberigitaj postulas voĉdonon. Unuvorte, estis sukcesplena tago por la voĉdemandistinoj kaj precipe por la organizistinoj de tiu neordinara elmontraĵo. Tre verŝajne ili konvinkis multajn aŭskultantojn per siaj bonaj elektitaj argumentoj.

Por la samideanoj kiuj scias nenion aŭ malmulte pri tiu objekto, mi provos klarigi malmultvorte kial la virinoj postulas voĉon por la parlamentaj elektoj (kelkaj jam havas voĉrajton por la elektoj de la urbaj konsilantaroj). Jen la ĉefaj kialoj :

1e Virinoj estas devigataj pagi impostojn, kvankam ili havas nenion por diri, en la direkto de la lando kaj la uzo de tiuj impostoj, tio estas tiranaĵo ; 2e virinoj devas obei la leĝojn kiel la viroj, ili do devas havi rajton decidi kiaj tiuj leĝoj estos ; 3e ĉiuj leĝoj ne estas egalaj por viroj kaj virinoj, kaj ili ne estos ŝanĝitaj ĝis kiam la virinoj ne havos rajton voĉdoni ; 4e aldonaj leĝoj estas faritaj koncerne la virinojn, kaj tiaj leĝoj ne devas esti enkondukitaj en Parlamentejo, kie nur viroj estas respondaj ; 5e gravaj demandoj, kiel procento de infana mortado, edukado de la infanoj, laboro de edziniĝintaj virinoj, senokupado, salajroj, zorgoj donotaj al gemaljunuloj, k. c., ne povas esti bone deciditaj, se la vidmaniero de la virinoj ne estas pripensita ; 6e ĉiuj plej prudentaj viroj kaj virinoj akordiĝas diri ke decidoj apogitaj samtempe de viroj kaj virinoj estas pli valoraj ol tiuj apogitaj sole de viroj aŭ de virinoj ; 7e en ĉiuj landoj, kie la virinoj fariĝis voĉdonantinoj, reformoj pli rapide okazis ol antaŭe, kaj eĉ en Britujo la urbaj registaroj, ĉe kiuj virinoj povas intermiksi, en multaj gravaj demandoj antaŭen kaj ne malantaŭeniras la Parlamenton.

Tiuj kialoj akceptitaj, ni donu kelkajn pliajn klarigojn laŭ unu el la ĉefaj voĉdemandistinoj en Anglujo, Fino C. Pankhurst :

— Laŭ kiuj kondiĉoj la virinoj devas ricevi la voĉrajton ? Ili devas ĝin ricevi laŭ samaj kondiĉoj kiel la viroj, t. e., havus voĉon ĉiuj virinoj, kiuj pagos impostojn kiel bienulinoj, bienluantinoj, por servistoj, k. t. p. La edziniĝintaj personoj ne ricevus tiun voĉon, escepte se ili posedus iun specialan motivon por havi apartan voĉon ; ĝenerale estas do nur unu voĉo por geedzoj.

— Kian profiton tiu rajto havigus al virinoj ? Se virinoj havus voĉon, la Parlamentistoj pli zorge atentus la demandojn, kiuj ŝajnas tre gravaj al virinoj. Ekzemple edukado de infanoj, loĝejoj de laboristaro, zorgoj al la malsanuloj kaj maljunuloj, situacio de laboristinoj. Rilate ĉi tiun lastan punkton, laboristinoj ofte gajnas nur 4 Sd. po horo, kiam ili laboras hejme, kaj ĉe la fabrikejoj ili ricevas salajrojn de 3 ĝis 5 Sm. po semajno. Tio okazas tial ke virinoj estas juĝataj malsuperaj ol viroj, kaj ili mem tre ofte sin konsideras tiel, sociale kaj politike. Doni voĉrajton al la virinoj montros do al ili ke ili egalvaloras virojn kaj do devas peni ricevi pli bonajn kondiĉojn de vivo. Kaj ili tion ricevos, — kiel viroj tion havigis al si de 50 jaroj, — kiam voĉdonantinoj, ili povos sendi deputatojn ĉe la Parlamentejo kiuj plibonigos la leĝojn je ilia favoro. En Nova-Zelando kaj Aŭstralio, kie ĉiuj virinoj voĉdonas, la kondiĉoj de laboro estas tute ŝanĝitaj, kaj specialaj leĝoj estis faritaj koncerne la laboro en la fabrikejoj, k. c.

— Ĉu la familio estos ne zorgata kiam la virinoj havos voĉojn ? Tute ne, ĉar ili jam voĉdonas por la urbaj konsilantaroj kaj tio neniam invitis ilin ne prizorgi iliajn hejmojn. En la landoj, ĉe kiuj virinoj voĉdonas, ĉiuj familioj estas tiel feliĉaj kiel en la aliaj. Plie, nuntempe ke la Parlamentistoj sin tre forte okupas pri la plejbonigo de la hejmoj, estas necese ke la virinoj havu voĉrajton por esprimi siajn ideojn pri tiu grava temo.

— Kial la viroj devus helpi la virinojn ricevi voĉdonon ? Ĉar edzoj kaj patroj devas deziri plibonigojn en la situacio de virinoj, tial ke iliaj edzinoj kaj filinoj estu pli respektitaj kaj pli facile gajnu sian vivon. La malbonaj salajroj pagitaj al la virinoj ĉiutage fariĝas danĝero ĉiam pligrandiĝanta por la viroj. Kiom da mastroj, efektive, ne anstataŭigas laboristojn aŭ oficistojn per virinoj, kiuj tre ofte, se ne ĉiam, ricevas nur la duonon de la ordinara vira salajro. Tiuj plendindaj virinoj tamen devas tion akcepti, ĉar devas vivi. Sed samtempe multaj viroj, eĉ edziĝitaj kaj patroj de multaj infanoj fariĝas senlaboraj. La sola rimedo, per kiu la viroj povas malhelpi tiun malbonaĵon, estas havigi al la virinoj voĉrajton, tial ke ili povu kiel eble plej baldaŭ pligrandigi siajn salajrojn. Plie, doni al virinoj politikan respondecon, igos ilin pli kapablajn instrui siajn infanojn laŭ publika spirito kaj fari ilin indajn anojn de granda nacio.

Se la voĉdemandistoj postulas voĉrajton, ili tamen ne postulas la rajton fariĝi anoj de la Parlamento, kaj tion nur akceptos se iliaj samlandanoj ĝin deziras. Ĉu do la postuloj de la voĉdemandistinoj ne estas indaj je iom pli ol rideto, kiel diras multaj geviroj ? Ĉu ĉiuj viroj kaj virinoj ne devus pripensi tiu novan movon kaj subteni ĝin favore de la liberigo de l'virinoj ? La respondon mi lasas al miaj gelegantoj.

P. Bl.

* * *

NOV-ZELANDO

Auckland, Majo 1908.

La jara kunsido de la Nov-Zelanda parlamento kutime komencas en junio kaj estas finita en oktobro aŭ novembro. En la kunsido de la pasinta jaro, 1907, la reprezentantoj voĉdonis novan terleĝon, kiu lasis multajn posedantojn de bienegoj eviti ilian propran parton de la terimposto. kaj malhelpis la registaron en ĝiaj penoj helpi la kamparetanojn, kiuj ne povas havigi teron per kiu vivi. Longe oni diskutadis la proponatan leĝon, eĉ en la antaŭa kunsido, tiu de 1906, oni preparis kaj diskutis ĝin, kaj en la daŭro de la interkunsida tempo, la reprezentantoj diskutis la aferon kun la loĝantaro en publikaj kunvenoj ĉie en la lando, por ke ĉiuj sciu kaj pensu pri ĝi. Fine, en la kunsido de 1907, la proponita leĝo fariĝis vera leĝo. Tiu leĝo, inter alia, provizas ke la registaro aĉetu bienegojn por dividi en bienetojn je la prezo laŭ kiu la bieno estas taksata pro terimposto, aŭ laŭ kiu la posedanto pagas terimposton, kun aldono de 12 1/2 % al la taksata prezo. Tiu 12 1/2 % estas la plej alta procento aldonata, foje estas malpli, laŭ la tuta valoro aŭ prezo. En la pasintaj tempoj ofte okazis, kiam la registaro volis aĉeti bienegon por dividi ĝin, ke la posedanto postulis duoblan, eĉ trioblan prezon kompare kun tiu, je kiu la bieno estis taksata pro impostoj. Tial, kiam la posedanto ne volis vendi je justa prezo, la afero estis prenata en la « juĝejon de kompenseco », kie kelkaj taksitoj atestis pri la valoro de la bieno, kaj fine la juĝisto decidis kiom devis esti pagata. Tre ofte la prezo pagita atingis duoble pli ol tiun de la valoro taksata por impostoj ; ĉar la taksata valoro, laŭ kiu oni pagis terimposton, estis tiel malalta, kaj pro multaj aliaj ruzoj de la terspekulistoj, helpataj de la leĝistoj, la posedantoj de tiuj bienegoj povis eviti multe da sia propra terimposto, kaj tiel profite tenadi la teron dum la prezo estas pli kaj pli grandigata. Pro tio la terspekulisto aĉetis bienegojn por ke li poste vendu ĝin al la registaro ; kaj tiamaniere la prezo de tero estas multe plialtigita, kaj la kamparetanoj kiuj poste aĉetis aŭ luis kaj uzis la bienetojn devis pagi tro grandan prezon aŭ terluprezon. Sed nun, la posedantoj de grandaj bienoj kaj la terspekulistoj timas lasi sian bienegon esti taksata je tro malgranda prezo pro impostoj ; ĉar la registaro povas iatempe preni ĝin je la taksata prezo ; tial ili devas pagi almenaŭ duoblan imposton ol tiu, kiun ili antaŭe pagis. Tio estas tia peza ŝarĝo al la posedantoj, ke ili nun deziras vendi porciojn da tero al la kamparetanoj. La nova leĝo komencis sian propran agecon je la 1a de aprilo 1908, kaj ni multe jam aŭdas pri ĝia influo al la tervaloroj. Hodiaŭ ni vidas en konservativa ĵurnalo plendon de spekulisto pri multaj bienoj kiujn oni deziras vendi, sed kiuj ne povas trovi aĉetantojn je la prezo ankoraŭ postulata. Sendube, la prezo de tero baldaŭ estos malpli granda. Tio estas bone. La nova leĝo marŝas, kaj eble la uzonto de kampa tero povas atingi sian celon, kaj aĉeti aŭ lui teron je justa prezo — je prezo kiu lasos la uzanton vivi kun iom malpligranda ŝarĝo sur liaj ŝultroj.

Multe faris la liberala registaro en la daŭro de la pasintaj deksep jaroj, penante helpi la plimulton, tio estas tiuj kiuj faras la laboron de la lando, sed la rezulto de ĝiaj penoj estis, ĝis nun, plialtigi la tervaloron de la terspekulistoj kaj terantoj, kaj daŭre, metadi monon en iliajn poŝojn. Nun la peno de la registaro trafis la celon, kaj multaj ĝojas pro tio.

T. L. S.

SVISUJO

Berno, Julio 1908.

Ni jam kelkafoje aludis pri la rajto de referendumo kaj iniciato, kiujn jam de longe posedas la Svisa popolo. Ni rememorigu rapide en kio ili konsistas. Kiam leĝo estis akceptita de la Parlamento, 35,000 regnanoj en tempolimo da tri monatoj havas la rajton postuli, ke la dirita leĝo estu submetata al la voĉdonado de la tuta regnanaro: tion oni nomas referendumo. Iniciato konsistas en tio. ke 50,000 regnanoj havas la rajton postuli, ke iu difinita leĝopropono estu diskutata en la Parlamento kaj poste submetata al la popola voĉdonado, kia ajn estas la opinio de la Parlamento. Fine, ĉiuj ŝanĝoj aŭ aldonoj en la konstitucio estas devige submetataj al la popola verdikto. Krome, kiel mi klarigos pli detale en venonta artikolo, ne nur la Konfederacio, sed ĉiu kantono aparte posedas tiujn rajtojn, laŭ kondiĉoj iom malsamaj.

La lastan fojon, kiam la Svisa popolo faris uzon de tiu rajto. la demando estis pri milita leĝo, kiu estis akceptita per negranda plimulto. Tiam estis referendumo. La 5an de julio, nia regnanaro solvis alian ĉefgravan demandon, nome la malpermeso de la fabrikado kaj vendado de likvoro absinto. Jam antaŭ kelkaj monatoj, sekve de multaj krimoj kaŭzitaj de absintismo, la kantono Vaud per popola voĉdono malpermis absinton (22 407 jes kontraŭ 15.596 ne). La Geneva kantono, post popola iniciato sekvis la saman vojon (7907 jes kontraŭ 7,184 ne). Sed en tiu lasta kantono, la leĝo estis malbone kaj malfacile aplikita, kaj tuj post voĉdono, nova iniciato postulis, ke oni forigu la leĝon! Intertempe, 165,000 regnanoj proponis, ke oni voĉdonu la malpermeson pri tuta Svisujo. La leĝpropono diras, ke la fabrikado kaj vendado de la likvoro absinto aŭ similaj estas malpermesataj sur la tuta Svisa territorio. La Federala Konsilantaro unuanime proponis al la Parlamento, ke ĝi ne akceptu tiun proponon kontraŭan al la komerco- kaj industriolibereco. Tiu opinio ne estis sekvita, kaj la du ĉambroj akceptis la iniciaton. En la popola voĉdonado, la malpermeso estis akceptita de 223.675 voĉoj kaj rifuzita de 134.490. La propono do plene sukcesis, kaj baldaŭ absinto devos esti elpelita el Svisujo. Ĉiuj germanlingvaj kantonoj voĉdonis jese; tio estas ne tro rimarkinda afero, ĉar en tiuj kantonoj la absinto ne estis ĝis nun multe konsumata. La franclingvaj kantonoj, kie la konsumado estis pli grava ĝin akceptis escepte Neuchatel, kie estas la gravaj absintfabrikejoj kaj Genevo, kiu tute malkonfirmis sian lastjaran opinion (5.760 jes, 8.830 ne) per granda plimulto; Vaud ĝin konfirmis. Vole-nevole, la absinto estos forigata el la tuta kantonaro; la iniciato de la Genevaj absintanoj restos per tio tute sen celo. Tio estis ŝatinda venko de la antialkoholuloj. Preskaŭ ĉiuj gazetoj kaj partioj rekomendis la akcepton, sed tio ofte tute ne estas kaŭzo de akcepto. Estas verŝajne, ke tiu ekzemplo influos la aliajn landojn, kie absinto fariĝis danĝero socia, kaj estas kuraĝige, ke demokrata lando ne ŝancelis ĝin forigi per la voĉo popola.

A.

Kroniko Politika

Prezidanto Fallières baldaŭ daŭrigos sian devigan vojaĝaron tra la diversaj Eŭropaj kortumoj per vizito al la Skandinavaj reĝoj kaj poste al la imperiestro de Rusujo. Por iom forigi la efekton de ĉi tiu lasta vojaĝo, kelkaj gazetoj aludis pri la eventualeco de renkontiĝo inter la caro kaj la imperiestro de Germanujo, sed tio estas nepreciza famo, kiun nenia fakto pravigis. Cetere, tia renkonto ne estas necesa por plifortigi la jam de longe ekzistantan amikecon inter la rusa kaj germana kortumoj, amikecon, kiu estas kaŭzata ĉefe de la interna politiko de ambaŭ ŝtatoj kaj kiun ne povis kaj ne povos nuligi la interkonsento de Rusujo kun Britujo.

Malmultaj gravaj novaĵoj ĉe la politika horizonto: En Belgujo la demando pri Kongolando estas en sama stato, same en Francujo pri Maroklando; nova kronprinco naskiĝis en Hispanujo; en Svisujo la popolo voĉdonis la malpermeson de absinto, fine, ekstereŭrope, le regnestro de Persujo, finis sian pafadon kaj mortigadon per amnestio, okazis revolucio en Paragvajo, kie la Prezidanto estis perforte ŝanĝita, laŭ la kutimo, kaj ministrara krizo, jam solvita, en Japanujo.

A. R.

La Faktoj

20-21. Parmo. — Gravaj konfliktoj de la soldataro kun la manifestantoj de la agrarista striko.

20 Abisenujo. — Neguso Menelik elektas kiel kronheredonton Lig-Jesû.

22. Milano — Sukcesaj eksperimentoj de la flugmaŝino de Delagrange.

Londono. — Manifestado de 200,000 voĉdemandistinoj kun 700 flagoj.

Peterburgo. — Morto de la glora rusa muzikisto Rimsky-Korsaroff.

23. Zirl. — Grava brulado apud Innsbrück.

Kanado. — Grava brulado apud Montreal.

Hispanujo. — Naskiĝo de princido

Teherano. — La regnestro bombardigas la palacon de la Parlamento.

Konstanco. — Rimarkinda sukceso de la aerŝipo « Zeppelin ».

24. Teherano. — Proklamo de la regnestro al la popolo

Nov-Yorko. — Morto de G. Cleveland, eksprezidanto de Usono.

25. Curuña. — La hispana vaporŝipo Larrache malflosiĝas; 130 dronintoj.

26. Meksiko. — Bando de ribelantoj atakas Las Vacas; 50 mortintoj.

Parmo. — Fino de la generala striko.

Montenegro. — En la proceso de la bomboj, 6 personoj estas kondamnitaj je morto, aliaj je gravaj punoj.

Sofio. — Malfermo de la ordinaro kunsido de la Deputataro.

Clinton (U. S. A.). — Ciklono detruas parton de l'urbo.

Teherano — La regnestro publikigas amnestion.

29. Romo. — Nasi eliras el malliberejo. — La Deputataro malakceptas la projekton por pliigo de la stipendioj de la universitataj profesoroj.

Hispanujo. — Baptosoleno de la nova princido Jaime.

1 Julio. — *Constanco.* — Aerŝipo « Zeppelin » plenumas 12-horan vojaĝon laŭ antaŭfiksita plano.

4. Asuncion. — Revolucio en Paragvajo.

Katerino (Rusujo). — Eksplodo en karbominejo; 228 mortintoj.

Peterburgo. — Morto de eksministro kaj eksambasadoro Nikolo Ignatieff.

5. Nov-Jorko. — Morto de la Usona verkisto Chander Harris

Parizo. — Inaŭguro de monumentoj al Michel Servet kaj al la poeto Manuel

Svisujo. — Popola voĉdonado malpermesas la fabrikadon kaj vendado de absinto.

A. Tellini.

ESPERANTO

MOVADO ESPERANTISTA

Esperantista Akademio.

La propono pri la reorganizo de la Lingva Komitato estis favore akceptita de la komitatanoj. Laŭ tiu nova organizo, ekzistas konsulta komitato kiu konsistos el ĉiuj ĝisnunaj L. K anoj kaj kompetentuloj pri lingvaj demandoj. Tiu komitato elektos Akademion da 18 anoj por 9 jaroj, rebaloteblan potrione ĉiun trian jaron. La Akademio esploros la demandojn, kiujn ĝi elektis per propra iniciato kaj ĉiujn demandojn prezentitajn al ĝi per favora raporto subskribita de almenaŭ 5 anoj de la konsulta komitato. La decidoj de la Akademio ricevos leĝforton nur se, tri monatojn post konigo al la L. K., ili ne estos malaprobitaj de pli ol unu triono de la L. K. Se post la diritaj tri monatoj, pli ol triono de la L. K malaprobis tian decidon, ĝi estos diskutota denove de la Akademio kaj la finan decidon faros la L. K. per plimulto de voĉoj. El 80 respondintoj, 66 komitatanoj aprobis la projekton, 7 malaprobis, 7 ne volis voĉdoni. La prezidanto submetis al la L. K. anoj liston de 24 kandidatoj al la Akademio, inter kiuj ili elektos komence nur 12. Jen la kandidatoj: Ahlberg, Bein, Boirac, Cart, Cejka, Ellis, Fruictier, Grabowski, Hanauer, Huet, Kühnl, S. Meyer, Millidge, Moch, Mybs, Nylen, O'Connor, Renard, de Saussure, Schafer, Schneeberger, Schröder, Skeel-Giorling, Villanueva, Wackrill. Zakrzewski. La kalkulo de l'voĉoj okazos la 1an de aŭgusto La Akademio kunvenos en Dresdeno la 10an de aŭgusto.

⁂ En « Lingvo Internacia » aperis interesa letero de D-ro Zamenhof pri la rolo kaj aŭtoritateco de la Lingva komitato Ni rekomendas ĝian legadon al ĉiuj, kiujn interesas tiu demando nun pridiskutata

Notindaĵoj.

Britujo: La Brita nacia kongreso en Edimburgo kunigis pli ol 500 Esperantistoj de ĉiuj Britaj regionoj. Regis plej ĝojiga entusiasmo Paroladoj de S-roj Mann, Pollen, Mudie, Buchanan, konigis al multenombra publiko nian aferon laŭ diversaj vidpunktoj. Entute tre fruktoporta kunveno, kiu faris gravan kaj daŭran impreson. — *Francujo:* Fondiĝis Federacio de la grupoj de Norda Francujo. Sukcesa festo en Parizo okaze de la disdono de la premioj al la kursanoj, tre multaj en 1908. — *Germanujo:* Sukcesaj paroladoj de S-ro Reicher en diversaj rondoj. La kongresaj aranĝoj multe progresas. La urbestraro sin montras tre favora al nia afero. Novaj grupoj en Aschersleben, Marburg, Münster, Oppeln, Tilsit. — *Hispanujo:* Sukcesa movado en Bilbao, Madrido, St-Sebastian, Barcelono, k. t. p. En tiu urbo oni sugestas inviti la 5an kongreson. — *Usono:* Paroladoj kaj kursoj de S-ro Privat en Warren, Elgin, Dundee, Batavia, Chicago, k. t. p. Esperanto estas tre favore akceptata en multaj lernejoj. En julio okazos grava kongreso en la fama instituto Chantaugna. — *Cilio:* En tiu lando ekzistas tre prospera movado. La landa societo posedas jam pli ol 20 viglaj grupoj.

Gazetaro.

Oficiala gazeto Esperantisto (monata organo de la Lingva Komitato kaj de la konstanta komitato de la kongresoj; eldonejo: Centra Oficejo. Jarabono: 2 Sm.). — *La Spritulo* (monata gazeto ilustrita, por serĉo, humoro kaj satiro, Leipzig, Sm. 1,20). — *La du Steloj* (monata organo de la Cila Esp. Asocio. Santiago. Jarabono: 2 Sm.).

★

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

OFICIALA INFORMILO

Fako 1a. — Administrado

Avizoj al Delegitoj. — Ni rememorigas al la Delegitoj. kiuj tion ne ankoraŭ faris, ke ili bonvolu kiel eble plej rapide sendi al ni la liston de la U. E. A. anoj ĝis nun varbitaj kune kun la ricevitaj kotizaĵoj Por malgravaj sumoj, la Delegitoj, estas petataj pagi per Esperantomarkoj prefere ol per sialandaj poŝtmarkoj.

⁂ La listo de la Delegitoj, Subdelegitoj, Konsuloj, k. a., de U. E. A. estas nun en preparado kaj aperos en la fino de julio. Ĉiuj Esperantianoj povos ĝin ricevi kontraŭ la sendo de 10 Sd. (Esperanto-markoj rekomendataj); por 10 ekzempleroj, 75 Sd. Ni rekomendas al ĉiuj niaj anoj, ke ili nepre havigu al si tiun adresaron.

Aliĝoj. — Ni rememorigas, ke ĉiuj personoj, kiuj dezirus aliĝi al U. E. A. kaj loĝus en lokoj, kie ne estas ankoraŭ Delegito aŭ Subdelegito, bonvolu sendi al ni sian aliĝon kun la kotizaĵo (24 Sd.). Ĉiuj donacoj, eĉ plej ne gravaj, estos danke akceptataj por nia centra kaso.

Propagando por U. E. A. — Artikolo pri U. E. A. jam aperis en multegaj gazetoj naciaj. per la zorgo de niaj Delegitoj. Citi tiujn gazetojn, el kiuj kelkaj estas el la plej gravaj kaj disvastigataj, estas al ni tute neeble. Ni tre dankas la Delegitojn, kiuj klopodis por tio kaj sendis al ni ekzempleron de la diritaj gazetoj La vojaĝoj organizataj de U. E. A. jam estis kaj ankoraŭ estos kaŭzo de multaj artikoloj en la naciaj ne-esp. gazetoj, kiuj multe pli volonte enpresas precizajn faktojn kiel informojn, ol diskutajn artikolojn pri Esperanto.

Ni ankaŭ dankas la jenajn gazetojn esperantistajn, kiuj raportis pri U. E A., plie ol tiuj jam cititaj en nia lasta no: *British Esperantist, Tra la Mondo, Revuo, Pola Esperantisto, Ceskych Esperantisto, Verda Stelo, Lumo.*

⁂ Okaze de la Esp. festo regiona en *Marseille,* nia sindona delegito, D-ro Rapine, uzis la okazon por konigi U. E. A. al la Provencaj samideanoj; ĉiuj promesis aliĝi kaj ankaŭ propagandi. Same agis, nia helpkomitatano D-ro Whitaker la 4an de julio en *Blakpool,* ĉe la kunveno de la Lancashire'a Esp Federacio, kaj la prezidanto de U. E. A., H B. Mudie, ĉe la kongreso de la Britaj Esperantistoj en *Edimburgo.* Imitindaj ekzemploj!

Kunvenoj de U. E. A. — Ni ne povas ankoraŭ konigi la horojn kaj datojn precizajn de niaj kunvenoj en Dresdeno. Unu solena malferma publika kunveno okazos en unu el la grandaj haloj difinitaj por la kongreso. Plie, okazos du aŭ tri laboraj kunvenoj por niaj delegitoj. La tagordo enhavos jenajn temojn: 1e) Raportoj pri la ĝisnuna agado de U. E. A kaj ĝiaj planoj por la estonteco; 2e) Diskutado de la projekto de definitiva regularo; 3e Ekzameno de la financa situacio, prezento de la budĝeto kaj voĉdonado pri la kotizaĵo de 1909; 4e) Proponoj de la Delegitoj; 5e) Projektoj por 1909a (kreado de novaj fakoj, kreado de Esp. hoteloj, de Esp. mutualo, esperantista banko, k. t. p.). La Delegitoj, kiuj dezirus prezenti raporton aŭ fari proponon ĉe tiuj kunvenoj, estas petataj sciigi tion al ni kiel eble plej baldaŭ kaj nepre antaŭ la 31a de julio.

La Delegitoj ricevos tre baldaŭ la projekton de neprovizora regularo de U E A. Tiu projekto estos diskutata en Dresdeno kaj poste submetata al la sekreta kaj koresponda voĉdonado de ĉiuj Delegitoj.

Subdelegitoj. — Ni tre dankas ĉiujn personojn, kiuj bonvolis preni sur sin la oficon de subdelegito. Ni rememorigas ke la Subdelegitoj korespondas kun la Delegito de sia regiono pri ĉio, kio koncernas U. E. A.; se ne estas Delegito, ili rilatu provizore kun ni. La Subdelegitoj havas la samajn rajtojn kiel la Delegitoj pri la senpaga enpreso de iliaj komunikaĵoj en nian oficialan gazeton.

2a Listo de subdelegitoj:

Heringen-a/-H. (Germ). S-ro F. Baldow (r.: Nordhn)
Verdun (Franc.) — S-ro L. Adam (reg.: Nancy).
Gent (Belg.). — S-ro J. Barbe-de-Kneef.
Mülhaüsen (Germ.). — S-ro F. Beck.
Marcilloles (Isère-Franc). — S-ro E. Champelay.
St-Omer (Franc.). — S-ro E. Deligny.
Wiesbaden (Germ.). — S-ro L. Istel.
Tübingen (Germ.). — S-ro P. Merkle
Tesêtice u. Olomouce (Bohem.). — S-ro Otrubap.
Cholet (Franc.). — S-ro G. Tetaud (r.: Angers).
Poremba (Schlesien-Aŭstrio). — S-ro K. Hruska.
Geising (Erzgeb-Germ.). — S-ro T. Bedrich.
Aibar (Navarra-Hisp.). — S-ro E. Altavás.
Serres (Htes-Alpes-Franc.). — S-ro L. Faucher.
Adelboden (Svisujo). — S-ro O. Hopf.
Fourques (Pyr.-Or. Franc). — S-ro Andreu.
Metz (German.). — S-ro H. J. Hoen.
Rusĉuk (Bulgar.). — S-ro Fr. Barth.

Entute 55 subdelegitoj. Ĉiuj samideanoj, kiuj estas pretaj plenumi la diritan oficon, bonvolu skribi al ni.

Novaj grupaliĝoj. — De la lasta no, la jenaj grupoj elektis delegitojn:

Alicante (Hisp.). — S-ro M. de Elizaicin.
Barcelona (Hisp.). — S-ro Ferrer de Eixala.
Saumur (Franc.). — S-ro D-ro Gilbert.
Enguera (Hisp.). — S-ro M. Jordá Garcia.
Gonda (Holando). — S-ro Ch. Lafeker.
Sta-Cruz de Tenerife (Hisp.). — S-ro E. G. Rivero.
Tokio (Japanujo). — S-ro Cif. Tosio.
Aix-en-Provence (Franc.). — S-ro L. Cauvet.
Praha (Bohem.). — S-ro Ed. Kühnl; S-ro Salamon (por *Bohema Asocio Esperantista*).
Helsingfors (Finl.). — S-ro A. Sandström.
Mexico (Meksik.). — S-ro L. G. Leon; F-ino M. de la Luz Magaña; F-ino Castillo y Astrain.

⁂ S-ro D-ro H. Moiser, delegito de Gratz, informas nin, ke la Stiria Esp. Societo, « decidinte akcepti ankaŭ la lingvon de la Delegacio al elprovo », eliras el U. E A. kaj revokas la oficon de sia Delegito.

Entute 136 lokoj kun 181 delegitoj kaj 55 subdelegitoj.

⁂

Fako 3a. Turismo. —

VOJAĜO A. — Ni ĉi tie liveras la definitivajn prezojn por ĉi tiu vojaĝo. La prezoj por la IIa klaso iom ŝanĝis, kaj la prezo por la IIIa klaso de Lyono al Lyono ne estis ĝuste kalkulitaj. Jen la korektaj prezoj por vojaĝo A:

a) Tra Berlino-Frankfurto:

de Portbou-Dresdeno-Portbou,
IIa kl.: Sm. 126,50 — IIIa kl.: Sm. 79.
de Lyono-Dresdeno-Lyono,
IIa kl.: Sm. 103. — IIIa kl.: Sm. 57,20.
de Genevo-Dresdeno-Genevo,
IIa kl.: Sm. 85,50 — IIIa kl.: Sm. 52.
de Lucerno-Dresdeno-Lucerno,
IIa kl.: Sm. 71,50 — IIIa kl.: Sm. 43.50.

b) Tra Munĥeno:

de Portbou-Dresdeno-Porbou.
IIa kl.: Sm. 121. — IIIa kl.: Sm. 77.
de Lyono-Dresdeno-Lyono,
IIa kl.: Sm. 91. — IIIa kl.: Sm. 55,20.
de Genevo-Dresdeno-Genevo,
IIa kl.: Sm. 80. — IIIa kl.: Sm. 50.
de Lucerno-Dresdeno-Lucerno:
IIa kl.: Sm. 65. — IIIa kl.: Sm. 39.

Ĉiuj biletoj daŭros 60 tagojn. Oni do povos laŭvole restadi pli longatempe en Dresdeno, Weisser Hirsch, Berlino, k. t. p, aŭ reveni per iu ajn vagonaro. Sed estas necese, ke ĉiuj kunvojaĝontoj por la *iro* nepre uzu la karavanan vagonaron. Eble, la biletkostoj por Francoj kaj Hispanoj ankoraŭ iom malpligrandiĝos, ĉar ni skribis al la Direkcio de la fervojo P. L. M kaj du Midi por atingi plej gravan rabaton. Kiel oni vidos, la prezoj de la IIa klaso iom ŝanĝis, ĉar la ĝisnuna kalkulo ne estis ĝusta. Ankaŭ la prezoj de IIIa klaso de Lyono ne estis korekta. Oni atentu bone pri tio. *Cirkulero kaj detala programo tre baldaŭ estos sendata al ĉiuj aliĝintoj kaj al ĉiuj personoj, kiuj tion petos.* La mono por la biletoj devos esti sendata antaŭ la **25a de Julio** al S-ro Schmid, Esperantio, *Bern* (Svis.).

Horaro. — Merkredon 12 aŭg. — Genevo, 6 h. 50 mat.; Lucerno, 6 h. 05 vesp. (Dum la veturado Genevo-Lucerno nenie estos sufiĉe da tempo por bona tagmanĝo, oni do kunportu iom da provizo; en Meggen bona vespermanĝo po *1 Sm.* Festeto en la *Paradizo* kun iluminado de l'vasta parko, iro kaj reiro de Lucerno al Meggen per speciala ŝipo. Loĝado en Lucerno en diversaj hoteloj).

La Burgonjaj partoprenantoj povos mendi la bileton de Dijon. Ili estas petataj troviĝi en Lausanne nepre la 12an de aŭg. frumatene.

Ĵaŭdon 13 aŭg. — Lucerno, 6 h. 02 mat.; *Zürich,* al. 7 h. 41, for. 8 h. 51 (tempo por matenmanĝo aŭ promenado al la lago). Innsbruck, al. 3 h. 25, forv. 6 h. 35. (Por gajni sufiĉan tempon por la restado en Praha, ni mallongigis la restadon en Innsbruck kaj elektis veturadon dum la nokto. En Salzburg ni havos halton de 12 h. 45 ĝis 1 h. 20 (nokte) por preni treŝigaĵon; de Salzburg ĝis Linz vagonaro kun nur II kaj Ie klasoj; do malgranda plipago).

Vendredon 14 aŭg. — Praha, al. 11 h. 34 mat. Restado ĝis la sekvanta tago 2 h. 56 postmeze. Niaj Delegitoj en Praha zorgas konvenan loĝadon, bonajn ne tro multekostajn manĝojn, vesperan kunvenon kun la tervora grupo, viziton de la Jubilea Ekspozicio, k. t. p. (loĝado, ĉambro kun 1 lito 1,30 Sm.).

Sabaton 15 aŭg. — Praha, for. 2 h. 56 kune kun la Praha'aj samideanoj. — *Dresdeno,* al. 6 h. 53 (vespere).

Reveno:

a) *Tra Berlino-Frankfurto:*

Dimanĉon 23 aŭg. — Dresdeno, for. 10 h. mat. kune kun la karavanoj B, C & D. *Berlino,* al. 12 h 52. (Restado kun la aliaj karavanoj).

Berlino, for. 1 h. 50 (marde aŭ merkrede); *Frankfurt,* al. 11 h. 35 vesp. (loĝado kaj vizito); for. 7 h. 15 mat.; *Basel* 12 h. 40 (disigo de la karavano.)

b) *Tra Munĥeno:*

Dimanĉon 23 aŭg. — Dresdeno, for. 7 h. 20; *München,* al. 8 h. 50 vesp. (Restado dum 1 aŭ 2 tagoj laŭvole, la biletoj rajtigas al revenu per iu ajn vagonaro), for. 8 h. 15 mat.; Zürich, 2 h. 40 (tagmanĝo); Lucern, 6 h. 36. Oni povos aŭ resti en Lucerno aŭ Meggen aŭ forveturi kaj alveni en Bern 11 h. 15 (vesp.), Genevo 1 h. 08 (nokte).

⁂

VOJAĜO B. — La agentejo ne ankoraŭ sendis la biletprezojn por la urboj inter Bordeaux kaj Dresdenon. Kiel komparilon ni donos la prezojn de Irun (franc-hispana limo).

a) Reveno tra Berlino-Rotterdam:

de Irun-Dresdeno-Irun,
IIa kl.: Sm. 110. — IIIa kl.: Sm. 73.

b) Reveno tra Leipzig-Frankfurt:

de Irun-Dresden-Irun,
IIa kl.: Sm. 106. — IIIa kl.: Sm 71.

La biletprezoj definitivaj kaj la detala programo estos konigitaj per speciala cirkulero nun preparata, kiun ricevos ĉiuj aliĝintoj kaj ĉiuj personoj, kiuj deziras partopreni. Oni nepre mendu ĝin. Kiel por vojaĝo A, la biletoj valoros 60 tagojn. Oni do povos reveni per iu ajn voganaro. Sed estas necese, ke oni uzu la karavanan vagonaron por la iro.

Horaro. — Parizo, 7 h. 05 (ĵaŭdon 13 aŭg.); *Namur,* al. 12 h. 28, for. 12 h. 31; *Liège,* al. 1 h. 35, for. 3 h. 25 (tagmanĝo); *Moresnet,* al. 5 h. 12 (festeto, vespermanĝo), for. 9 h. 33; *Köln,* al. 11 h. 03 (loĝado), for. 8 h. 10 mat. (vendrede); Leipzig, al. 9 h. 19 (loĝado), for. 4 h. 47 aŭ 6 h. 48; Dresdeno, al. 6 h. 17 aŭ 8 h. 41 (sabate).

Reveno:

Vojo a). — Dresden, for. 10 h. (aŭ 2 h. 12), (dimanĉe); Berlino, al. 12 h. 52 (aŭ 4 h. 59), (restado tri tagojn laŭvole kun la aliaj vojaĝantaroj) ; Berlin, for. 7 h 41 (aŭ 8 h. 38) ; Hannover, al. 12 h 17 (aŭ 12 h. 87), for. 12 h. 50 ; Amsterdam, al. 8 h. 03 (aŭ loĝado aŭ for. 9 h.56 aŭ 8 h. 45) ; Rotterdam, al. 11 h. 43 (aŭ 10 h. 23). for. 12 h 40 (aŭ 2 h. 38) ; Anvers, al. 4 h. 30 (aŭ 4 h. 55), for. 5 h. 12 (aŭ 6 h. 18) ; Gent. 6 h. 49 (aŭ 8 h. 15 loĝado eventuale), for. 7 h. 17 ; Lille, al. 10 h. 11 (loĝado eventuale), for. 9 h. 10 (aŭ 1 h. 34, aŭ 7 h.) ; Parizo, al. 12 h 05 (aŭ 5 h 14, aŭ 11 h. 25). — Event. : Lille, for. 10 h. 25, Paris, al. 4 h 37.

Vojo b). — Dresden, for. 7 h. 15 (aŭ 8 h., aŭ 10 h. 34) ; Leipzig, al. 9 h. (aŭ 9 h 47, aŭ 12 h 25), for. 9 h. 19 (aŭ 12 h. 26. aŭ 12 h 40) ; Erfurt, 11 h. 07 (aŭ 1 h. 49, aŭ 2 h 53) ; Frankfurt, al. 3 h. 33 (aŭ 7 h. 13, aŭ 8 h. 02, loĝado event.), for. 7 h. 11 (aŭ 8 h. 24, event.) ; Mainz, al. 7 h. 50 (aŭ 9 h. 04, loĝado) ; Metz, al. 12 h. 34 (aŭ 1 h. 57), for. 12 h. 44 : Nancy, al. 1 h. 40 (aŭ 11 h. 15), for. (Pariza horo), 1 h. 10 (aŭ 10 h. 58) ; Paris, al. 6 h. 38 (aŭ 5 h.) — Restadoj en Leipzig, Frankfurt, k. t. p., laŭvole.

La cirkulero kun la mendilo estos sendata en la mezo de julio. Oni estas petata ilin resendi *nepre* antaŭ la 25a de julio, al S-ro Pujula, 12, Avenue de l'Observatoire, *Paris*, aŭ al S-ro Schmid, Esperantio, *Bern* (Svis.), kun la mono.

⁂

VOJAĜO C. — La cirkuleroj pri tiu vojaĝo kun ĉiuj detaloj jam aperis. Por ilin ricevi sin turni al S-ro H. Bolingbroke Mudie, 67, Kensington Garden's Square, London.

⁂

VOJAĜO D. — La horaro de ĉi tiu vojaĝo jam aperis en nia antaŭlasta N°. La detalaj prezoj kaj plena programo estos konigataj per speciala cirkulero, kiu estos sendata al ĉiuj personoj, kiuj jam aliĝis aŭ al ĉiuj, kiuj deziras partopreni. Ni rememorigas ke ĉi tiu vojaĝo estas difinita precipe per Skandinavaj samideanoj.

⁂

Grava avizo. — *Ĉiuj personoj, kiuj deziras partopreni en unu el la karavanoj organizitaj de* U.E.A. *bonvolu* **tuj** *peti de ni la necesajn cirkulerojn.* Post la 25a de julio, la enskribado estos nepre finita.

Delegito - Konsuloj U. E. A.

PRAKTIKAJ INFORMOJ

Grava avizo. — Ni de nun *senpage* presos ĉiujn komunikajojn de la *U. E. A. Delegito-konsuloj* pri ilia agado, specialaj servoj faritaj de ili, esperantistaj hoteloj, firmoj kaj institucioj uzantaj Esperanton, k. t. p. Ili ankaŭ bonvolu sendi al ni nelongan informon pri ĉiuj okazintajoj aŭ okazontajoj lokaj, havantaj ĝeneralan intereson (ekz. komercaj kaj industriaj ekspozicioj, foiroj, festoj, turismo, k. t. p.) Tiuj informoj estu redaktataj mallonge kaj precize ; oni sendu ilin al ni nepre antaŭ la 10a kaj 25a de ĉiu monato por ke ili aperu en la plej proksima n°. Ni varme instigas ĉiujn delegitojn, ke ili bonvolu kiel eble plej akurate kunlabori por tiu rubriko, kiu dank'al ilia kunhelpo rapide fariĝos interesa kaj tre utila.

Belgujo

ANTVERPENO (493.1). D. : F. Schoofs ; Le Beck

⁂ Sur Avenue de Keyser, la plej trairata strato de Antverpeno malfermiĝis granda librejo kaj jurnalvendejo, sur kies montra fenestrego oni povas legi en verdaj literoj : *Esperanto-Oficejo.* Estas la « Librairie Bout D'Cigare », kie la Antverpenanoj kaj la multaj travojaĝantaj fremduloj povas aĉeti la jurnalon « ESPERANTO » kaj ĉiujn Esperantajojn. — Sabaton, en la grupo granda festo je la honoro de la grupanoj ricevintaj la ateston pri profesora kapableco de la B. L.

NAMUR (49.39) D.: Verbeken ; VD. : E. Pierre.

⁂ La grupo baldaŭ organizos ekskurson al Moresnet, por kiu jam estas multaj aliĝoj ; ĝi intencas doni, en komenco de l'vintro, grandan feston teatran. La sidejo de nia grupo estas la granda hotelo de l'urbo, kie la Esp-istoj ĉiam trovos bonegajn manĝojn po moderaj prezoj. Adreso : Hotelo de la Couronne, (placo de la stacidomo) — Jen rimarkinda industria afero : unu esp-ista lerninto, komizo ĉe maŝinfabriko « Le Progrès » rilatiĝas esp. kun rusa korespondanto en Varsovio ; ili korespondadis pri diversaj maŝinoj kaj fine la ruso sendis mendon por 10.800 Sm. La industria firmo estas kontentega pri tio kaj favoras Esperanton.

Britujo

BURNLEY (42.722). D. : I. L. Hartley ; II. W. R. Currie.

Esperantianoj : I. 1 E. Alee, 2. J Alexander, 3. W. E. Grabtree, 4. H. Harsaher, 5. J. Taylor, 6. W. West ; II. 7. W. B. Currie, 8. Ch A. Brear, 9. S-ino Cart, 10. H. Jattersal, 11. L. Hargreaves, 12. S-ino Jones, 13 W. Hargreaves, 14. Nicholas, 15. R. Holgate, 16. A. Sagar, 17. W. Lee, 18 Whiteside, 19. S-ino W. B. Currie, 20 J. S. Mackie.

BRADFORD (42.31). D. : A. Tuke Priestman ; VD. : J. T. Holmes

Esperantianoj : 1. Priestman, 2. Holmes, 3. E. Farnell, 4 L. Williams, 5. Crabtree, 6. W. Thislethwaite, 7. R. Whitaker, 8 R. Crowley, 9. C. Aikman, 10 F-ino Tardoff, 11. N. Calvert. 12. J. Whitaker.

Francujo

BEAUNE (44.42.2). — La dimanĉon 5an de julio, okazis granda propaganda ekskurso de la Federacio de la burgonjaj grupoj en la malnovan kaj interesplenan urbeton Cluny (elp. Klŭni). Tiu ekskurso bonege sukcesis. Ĉeestis anoj de la grupoj de Beaune, Châlons, Mâcon, Le Creusot, Roanne, entute 110 ĉeestantoj. Matene oni faris ĉarman promenadon ĝis la kastelo Saint-Point plej amata restadejo de la fama poeto Lamartine. Poste ĉiuj kunvenis en la hotelo de Burgonjo ĉirkaŭ tabloj bonege aranĝitaj. Post la tostoj, en Esperanto kompreneble, kaj rapida vizito de la vidindajoj de la urbo, nia terta kaj senlaca propagandisto S-ro Bord faris paroladon antaŭ 400 aŭdantoj kaj ricevis sian kutiman grandegan sukceson. Fine kelkaj geanoj de la grupo de Beaune ludis la « Heritage Klodarec », diris monologojn kaj kantis esperante kaj france. La rezultato estas plene kontentiga : ĉirkaŭ kvardek ĉeestantoj sin tuj enskribigis por formi novan grupon. Nia U.E. A. baldaŭ havos en Cluny novan delegiton kaj tio ne estas senutila ĉar tiu urbo ekster ĝia intereso historia enhavas gravajn profesajn lernejojn.

FIRMINY (445.813). D. : Laporte Maixent.

⁂ Por montri la multecon de la Firminy'aj Esp-istoj, la « Frata Ligilo » organizis sukcesan feston (koncerto kaj dancado). Pli ol 400 aŭskultantoj aplaŭdis tiun ĉarman manifestadon. La grupo baldaŭ organizos ekskurson, Esp.-Oficejon kaj starigos gastotablon.

LEVALLOIS-PERRET (443.612). D. : C. Rousseau ; VD. : P. Bidault

Esperantianoj : 1. P. Bidault, 2. A. Etelin, 3. C. Huchedé, 4 A. Lahure, 5. H. Gibart, 6. V. Hitzel, 7. S-ino Boistel, 8. H. Julitte, 9. Ch. Veret, 10. M. Pelissié.

LOUHANS (44.434). D. : J. Maublanc ; VD. : A. Jaillet.

Esperantianoj : 1. J. Maublanc, 2 E. Crison, 3. F. Reynier, 4. P. Roy, 5. H. François, 6. L. Bornet, 7. E. Perret, 8. Ch. Chaux, 9. Perraut, 10. H. Lanier, 11. A. Jaillet.

⁂ Dimanĉe 19an de julio, ekskurso en « Roches de Beaume » tre fama vidindajo en la montoj Jura kie ne estas ankoraŭ multe da Esperantistoj.

Sin turni al S-ro J. Maublanc, prez. de la grupo, Louhans.

LYON (44.582). D : M. Jabeuf ; VD. : F. Drudin.

Esperantianoj : 1. F. Drudin, 2. L. Poncet, 3. P. Vernu, 4. L. Grenouillat, 5. S-ino Farges. 6. J. Macé, 7 H Ricœur, 8. J. Meichel. 9 P. Deronsière, 10. G. Pouchot, 11. S-ino A. Macary.

NANCY (44.381). D. : D-ro Noel, P-ro Maresquelle

Esperantianoj : 1. E. Noël, 2. H. Maresquelle, 3. E. Thomas, 4. A. Navel, 5 O. Horiot, 6. F. Roy, 7. F-ino J. Perrin, 8. J. Villaume, 9. J. Daum, 10. M. Nieger, 11 G. Trecot, 12. S-ino Gaille, 13. F-ino M. Riston, 14. L. Lambert, 15. P. Ettinger, 16. F-ino C. Simette.

PARIS (44.361). D. : E. Robert ; VD. : V. Murati.

Esperantianoj : 1. V Murati, 2. J. Fisher, 3. J. Coulon, 4. W. Auber, 5. G. Gaucher, 6. E. Lafon, 7. J. Leroy, 8. P. Aniasi, 9. C. Dequivre, 10. M. Doué, 11. P. Mottet, 12. A. Blondomet, 13. M. Lefebvre, 14. P. Brumeteaux, 15. A. Brumeteaux, 16. A. Lecompte, 17 G. Mélo, 18. J. Schmitz, 19. L. Gayat, 20 E. Charlet, 21. D. Robert, 22. F-ino Stribick, 23 E. Bouché, 24. S-ino Dubor, 25. E. Helsey, 26 V. Politzer, 27. E. Boudret, 28. A. Besnard, 29 A. Guillermin, 30. A. Moriceau, 31. Ch. Fréhis.

⁂ *Gvidfolio* tra Parizo jus estis eldonita de la U. E. A. delegito ; ĝi estas ricevebla ĉe : Verda Stelo, 129, rue Marcadet : Presa Societo, 33, rue Lacepède ; Esperanto-Librejo, 15, rue Montmartre ; Bauché, 20, Bd Clichy ; Bernard, 26, rue Antoinette ; Robert, D., 5, rue Ravignan.

LA ROCHELLE (44.64). D. ; S. Meyer.

⁂ La 7-10 de junio okazis en La Rochelle la kvina *Nacia kongreso de Paco.* La francaj pacifistoj ekzamenis la nunan politikan situacion en Francujo kaj alilande, serĉis la plej taŭgajn rimedojn por propagandi pacifismon kaj batali kontraŭ militema ŝovinismo, kaj esprimis diversajn dezirojn komunikotajn al la franca registaro kaj al la internacia kongreso de Paco (Londono, 1908). La kongreso finiĝis per granda publika kunveno, en kiu 7 parolantoj klarigis la pacifistan programon kaj montris, ke ekzistas nenia « antanismo », inter pacifismo kaj vera patriotismo.

SENS (44.412). D. ; R. Deshays.

⁂ La Grupo de Sens organizis dum lokaj festoj per subvencio de l'urbestraro Esperantistan ekspozicion, kiu plene sukcesis kaj interesis eĉ la vilaĝanojn La propagando estos fruktodona en la tuta regiono, kie, post la someraj libertempoj kaj kamplaboroj, nepre fondiĝos filioj kaj filietoj.

TROYES (44.331).

⁂ La 17an de majo, la jara festo de l'Grupo de Troyes kunigis 100 geesperantistojn. La Akademia Inspektoro prezidis. Post la fino de la kvara kursoj, la « Atesto pri Lernado » estis aljuĝata al 19 kandidatoj.

⁂ La firmo Gujon & Fèvre, 40, rue Jaillant-Deschainets, elpensis digestigan likvoron « Flor' Esperanta ». 2 grandaj reklamaj bildoj estas pentritaj sur la muroj de la domo. P. K. Esperantiano. — S-ro Donnot, farmaciisto, 116, rue Tiers, P. K. Esperantiano. — La fame konata Restauracio Goubault, rue de la Monnaie, K. Rabato por la Esp-istoj. Esperantianoj. — F-ino Mathieu, gladistino, 57, rue de l'Hôtel-de-Ville, apud la granda Hotelo des Courriers. P. K.

Germanujo.

BAD GODESBERG (43.429). D. : H. Arntz ; VD. : Butin.

⁂ La Esp. gr. de Bad Godesberg, kuracloko kaj unu el la plej belaj urboj de la Rejno, apud Bonn kaj kontraŭ la « Sepmontaro », ĝojus, se ĝi povus saluti samideanojn. Delegito estas S-ro Arntz, Lessingstr. 5 ; vicdel. S-ro Butin, Kromprinzenstra., 33 ; konsulino por virinoj S-ino Marx, Friedhofstr., 1. Ĉiu ne-germana Esp-isto, kiu, sendos ilust. karton al la Esp. gr. ricevos ilustrajon de Godesberg.

MÜNCHEN (43.3). D. : A. Haugg ; VD. : A. Pischi.

Esperantianoj : 1. L. Walter. 2. A. Pitschi, 3. R. Meyer, 4. N. Windorfer, 5. S-ino H. Hammann, 6. J. Krumbach, 7. A. Rosa, 8. C Franz.

Hispanujo

BILBAO (46.61). D. : J. Alvarez, V. O. de Allende.

Esperantianoj : 1. R. Sauren, 2. A. S. Rivet, 3. J. Moreno, 4. J. D. Olavarria, 5. F. Diaz, 6. J. Velasco, 7. Ramiro Lopez, 8. P. Fernandez, 9. M. Laceta, 10. A. Garcia, 11. T. Elizondo, 12. F. Zargosa, 13. J. Lopez, 14. S. Hermandez, 15. M. Iniquez, 16. J. Amondo, 17 J. Rodriguez, 18. M Fuentes, 19. J. Dapena, 20. J. Santamaria.

⁂ Nova epoko por disvastigado de Esperanto en nia regiono malfermiĝis en tiu momento. Du kursoj funkcias ĉiutage, unu por s-roj farita de S-ro Elizondo, kaj alia por s-inoj donita de S-ro Alvarez. Ankaŭ ekskursoj estas organizitaj ĉiumonate ; la unua okazis en la Arboleda kaj la proksima havos lokon en Santurce la 28an de junio. Grandega entuziasmo inter ĉiuj por ĉeesti en tiu festo. La ekskurso al Arboleda bonege sukcesis. En Bilbao ekzistas gastotablo, en kiu kunvenas la samideanoj ĉiumerkrede nokte je 9 h. (16 Arenal) en belega centra kafejo (Café del Comercio), kies mastro kaj kelnero estas Esp-istoj. Ekzistas jurnaleto fondita de kelka tempo ; ĝi nomiĝas « Gastotablo » kaj ĝia direktoro estas S-ro I. Alvarez. Aperas merkrede ; estas la organo de la Esp-istoj de la regiono.

⁂ *Esp. firmoj.* — M. Fuento, Bidebarrieta, 9 (Esp. Of.) ; J. Dapena, Avenal, 16 (gastotablo, kafejo) ; A. Garcia, Granvia, 8 (librovendejo) ; Zulaica, Hotel de la Playa, Santurce (somerrestadejo).

CASTELLON (46.732). D. : I. S. Ferrer ; V[illegible]. : M. Escuder.

Esperantianoj : 1. J. S. Ferrer, 2. M. Escuder, 3. H. Hurtado, 4. C. Ortege, 5. L Izquierdo, 6. V. Aparici, 7. J. A. Nicolan, 8. J. T. Moreno, 9. S. Cervera, 10. C. de Filippo, 11. V. Escuder, 12. M. Herreros, 13. De Agullo de Izquierdo, 14. J Galvez, 15. M. Llach, 16. R Viciano. 17. A. Segarra, 18. A Salazar, 19. J. Ortiz Ferrer, 20. P. S. Cortès, 21. M. Cases, 22. R. Arias, 23. L. Bellés.

SAN SEBASTIAN (44.6). D. : Perez Alcorta ; J. Garrido.

⁂ San Sebastian estas unu el la plej ĉarmaj somerrestejoj en la mondo. Tre bone lokita, proksime de la Franca limo (20 kmj), kun multaj vojoj kaj ĉiuspecaj veturiloj. Alloga lando semita de belaj vilaĝoj kaj montoj por ekskursoj, kie oni povas ĝui plej vidindan pajzaĝon. Tie dum la somero kaj aŭtuno la estraro de la urbo kaj la granda kazino organizas tre gravajn festojn por fari agrabla la ĉeeston al la trapasantoj kaj loĝantoj. Plie la hoteloj kaj restoracioj francaj kaj hispanaj estas multnombraj. Jen estas ekstrakto el la programo por 1908 : ĉiunokta koncerto en la bulvardo ; naciaj kaj internaciaj ŝipkuradoj, remile kaj vele (25 al 31 de julio), aŭtomobilaj boatoj (31a de aŭgusto kaj 1, 2, 3 de septembro), 24.000 pesetoj por premioj kaj pokaloj de la gereĝoj ; grandaj toraj mortkuradoj (2, 9, 15, 16, 23 kaj 30 de aŭgusto kaj 6 de septembro), la plej famaj *toreroj* ; vaska *sport*, pilka ludo ĉiutage, mane aŭ ile (la plej bonaj ludantoj) ; ludĉevala konkurso internacia (12 al 23 de septembro) 45,000 pesetoj por premioj kaj pokaloj de la gereĝoj ; 6a internacia konkurso de Law-Tenis (1 al 9 de septembro) ; aŭtomobila festo, konkursoj kaj kuradoj (28 al 20 de septembro) ; aerostata festo kaj konkursoj (oktobro). Granda kazino, orkestro de 75 profesoroj sub la direkcio de la fama muzikisto Arbós (2 koncertoj ĉiutage, artistaj kaj klasikaj koncertoj), teatraj prezentajoj, dancoj, popolaj kaj infanaj festoj, k. t. p. — En San Sebastian oni parolas Esperante en : Hotel Restoran Internacional, stratoj San Martin kaj Prim ; Nuevo Bar, Malvarmigilejo de Redondo, strato Idiaquez ; Eibrejo Ferreirós, Avenidal, 3.

Por detalaj programoj por ĉiu speciala festo sin turni al : Sekretario de l'Grand kasino. Skribu Esperante.

⁂ La listo de Esperantianoj aperos en proksima N°.

⁂ En la bela urbo San Sebastian (Hispanujo) okazos Franc-Hispana kunveno aŭ ekskurso je la 26a aŭ 27a de julio, por solenigi la jarfeston de Esperanto.

Por detaloj sin turni al S-ro Delegito de U.E.A., Palacio de Bellas Artes, San Sebastian.

La Esperanto-Konsulo,
M. P. A.

Italujo.

NAPOLO (45.7). D. : R. Bagnulo ; VD. : S. Poltawsky.

Esperantianoj : 1. S. Poltawsky, 2. del Monaco, 3. di Raimende, 4. O. Brancaccio, 5. A. Bagnulo, 6. L. Gianco, 7. R. Vaglia, 8. F. Stajano, 9. R. Scirkess, 10. M. Kohan, 11. G. Cacciapuoti, 12. L. Stajano, 13. G. Farinari, 14. E. Testori, 15. F. Guerrini, 16. V. Tanturri.

⁂ Ni altiras vian atenton al jena provo tre interesa por nia afero. Efektivigante malnovan projekton, ni fine fondis en Napolo *oficejon por komercaj interŝanĝoj per Esperanto.* Se vi volos partopreni al tiuj interŝanĝoj, ni agados tiamaniere : la oficejo zorgos vendi produktajojn viajn aŭ de viaj samlandanoj, precipe specialajojn, en Napolo kaj ĉie ajn. Viaflanke vi zorgos same pri produktajoj, kiujn vi mendos aŭ kiuj estos de mi senditaj por vendo. Por atingi nian celon ni petas katalogojn kaj specimenojn kun plenaj informoj por negockondiĉoj, prezaro por mia afero kaj diskontoj pro kontanta pago, k. t. p. Sin turni al S-ro Adv. Rafaelo Bagnulo, Largo Gesù e Maria, 4, Napoli.

Per tiu propono adv. Bagnulo celas fondi gravan internacian instituton, kiu ne nur helpos privatajn interesojn de aliĝontoj sed vere fariĝos nova helpanta institucio komerca por reguligi la interŝanĝojn inter produktantoj kaj konsumantoj de malsamaj nacioj. La direktanta ofico, ĉe adv. Bagnulo, kolektas demandojn pri komercaj aferoj, petojn kaj proponojn de komercajoj, sciigojn kaj ĉion, kio povas interesi aferon aranĝotan. La instituto funkcios simplege. En ĉia urbo, laŭeble, kiel U. E. A., ĝi havas agenton, kiu klopodos diskonigi kaj disvendigi en sia urbo fremdajn produktajojn de sia urbo. Por naturaj produktajoj nova institucio estos vasta agento per mil brakoj ; por specialaj manofaritajoj ĝi estos sammaniere riprezentanto. Tial la firmoj, kiuj deziras diskonigi proprajn specialajojn, donas, per loka agento, riprezenton al instituto, kaj same faros ĉiuj produktantoj pri agenteco ; ĉiuj, dank'al vastega organizajo, estos certaj ke oni trovos landon, kie proponitaj komercajoj estos ŝatataj. Aliflanke, komercistoj povos, per instituto, aĉeti produktajojn preskaŭ de l'tuta mondo, kaj sekve la ŝatatajn en alia lando aŭ urbo. La agentoj ricevos taŭgan kaj sufiĉan procenton, laŭ kondiĉoj speciale kaj private aranĝotaj ; ili devas, mem por ilia intereso, zorgi por ke novajoj aperantaj en ilia loko estu diskonataj per riprezentanto de instituto, kaj por ke ĝi havu kiel eble plej multe da riprezentantoj. Fine ni petas delegitojn de U. E. A. sciigi al adv. Bagnulo komerciston aŭ riprezentanton, kiu volas fariĝi agento de nova instituto, kaj ĉiuj, kiuj tion volas, adresu proponon al dirita direktoro.

Instituto bezonas nur konestecon kaj lertecon, *ne monon* ; tial ĝi povas bone sukcesi. La agentoj, kiuj ne plenumas kontentige proprajn devojn, anstataŭiĝos. Direktoro ne deziras hierarkion, sed ordon ; tion bezonas ĉia serioza organizajo.

Rumanujo

BUKAREŜTO (49.8). D. : S-ro Giuglea.

⁂ Ĉiujaŭde vespere de 8a-10a h. kunveno de R. E. S. en lernejo C. A. Rosetti, str. C. A. Rosetti. Iu ajn esperantista trapasonta nian urbon estas invitita. S-ro I. Giuglea, delegito, str. Elefterie nou 4, respondas ĉiajn petojn kaj demandojn rilate sian landon. Por industriistoj, komercistoj tradukas el Rumane Esperanton kaj el Esperanto Rumanen. Oni aldonu p. m. por respondo.

Oni demandas de ĉie nomojn kaj adresojn de ĉiuj industriistoj, fabrikejoj, kumercistoj, k. c., uzantaj Esperanton, se eble ankaŭ reklamilojn anoncilojn.

Oficejo, str. Academici, 37. Malfermata ĉiutage 8-12, 1-8. Oni aĉetas, mendas tie ĉiujn esperantistajojn. Oni petas reprezenti esperantistajn firmojn. P. Neamt, Esperantejo, strato Lupusneam, 27, ĉe S-ro Faibis Schor. Informoj pri muelejoj kaj farmkomerco.

Svisujo

DAVOS (494.26). D. : Matthi ; VD. : Fino Herzog

Esperantianoj : 1. G. Matthi, 2. A. Knecht, 3. F-ino Herzog, 4. F-ino P. Day, 5. F-ino Ruesch, 6. E. Sachse, 7. S. Cioccarelli, 8. L. Dotti, 9. M. Disler, 10. J. Brand, 11. F-ino Veschth, 12. F-ino Rosler, 13. F-ino E. Rosler.

LAUSANNE (494.45). D. : A. Andreassian ; VD. : E Bussy.

Esperantianoj : 1. A Caumont, 2. F-ino Dutoit, 3. P. Ketterer, 4. F. Bussy, 5. A. Jaquillard, 6. F-ino Wannay, 7. F-ino Buche, 8. S-ino Wilson, 9. F-ino Lawrence, 10. F-ino Burnier, 11. S-ino J. de Bouzian, 12. Fleur-de-Lys, 13. C. Curchod, 14. A. Thonney, 15. Stewart-Sandemann, 16. Van Hengel, 17. Ed. Taillens. 18. A. Müller, 19. S-ino Andreassian.

ZURICH (494.3). D. : P. Muschamp.

⁂ Por eviti ĉiajn konfuzojn, la *Esperanta Societo Zuriĥa* decidis en sia kunveno de l'25a de junio klarigi al la esperantista publiko : 1e) ke ne plu S-ro Waltisbühl (Bahnhofstr. 46), sed S-ro D-ro M. de Terra (Bahnhofstr., 110) estas Esperanto-Konsulo ; 2e) ke la societo nek estas identa, nek havas iajn rilatojn kun la *ida* societo « Progreso » ; 3e) ke ĝia regula kunvenejo estas en Hotelo Jura (Limmatquai).

ESPERANTO-SOCIETOJ

Svisa Esperanto Societo. — La komitatoj de tiu Societo kunvenis en Berno la 5an de julio. Ili interalie decidis konfirmi la deklaron voĉdonitan en Solothurn, akcepti la eksiĝon de S-ro Waltisbühl ĝis nun Ia vicprezidanto, forstreki la grupojn de Zürich kaj Winterthur el la nomaro de la aprobitaj grupoj kaj proponi al la ĝenerala kunveno eksigon de S-ro L. de Beaufront el la vico de la honoraj membroj, pro lia perfida konduto kontraŭ D-ro Zamenhof kaj la Esperantistaro decidita). Ĉeestis : F. Schneeberger, R. de Saussure, J. Schmid, J. Feierabend, H. Stroele, F. Wenk, Th. Renard, E. Mallet, J. Wenger, J. Mattes, H. Hodler, H. Humberset.

PERESPERANTAJ SOCIETOJ

Internacia Societo de l'Esperantistaj Juristoj. — La I. S. E. J. havas celon krei kaj konservi inter siaj anoj aferajn rilatojn, konigi al la fremdaj juristoj la samideanajn kunfratojn aŭ jurlaborantojn en ĉia lando, ebligi la sendon de aktaro en la plej malproksimajn landojn kun cĕrteco trovi tie korespondanton, unuvorte unuigi la Esp. juristojn de ĉiuj landoj. La jara kotizajo kostas 1 Sm. ESPERANTO estas la oficiala organo de la I. S. E. J. Por ĉiuj informoj, sin turni al la Generala sekretario, S-ro Sergeant, advokato, 31, Bd Mariette, Boulogne-sur-Mer (Francujo), aŭ al la Socia Sidejo, 51, rue de Clichy (Centra Oficejo), Paris, Franco.

OFICIALA INFORMILO.

Novaj aliĝoj. — Francujo. — 1. S-ro Boudet, doktoro de Juroscienco, advokato ĉe la Apelacia Kortumo, Riom. — 2. R. de Lagarte, licenciato de Juroscienco, helpisto ĉe la Prefektejo de la Seine, 4, Villa d'Orléans, Fontenay-/s-Bois (Seine). — 3. S-ro Namur, notario, Condé-s/-Escaut.

Regularo-Nomaro. — Nun oni presas broŝureton kiu enhavos nian regularon kaj societajn nomojn ; baldaŭ ĝin ricevos niaj anoj.

Ĝenerala Kunveno. — Ni memorigas niajn anojn ke, laŭ nia regularo, la ĝenerala kunveno de l'I. S. E. J. okazos, dum la kongreso, en Dresdeno, kaj ni esperas ke ĉiuj ĝin ĉeestos. Plie ni havos ankaŭ aliajn kunsidojn dum kiuj ni laboros speciale pri la jurista vortaro. Anoncoj tie-ĉi kaj afiŝoj en Dresdeno sciigos la lokon kaj la horojn elektitajn pri tiuj kunvenoj. Bonvolu niaj amikoj ilin atente legi.

Ĉiuj anoj kiuj havas proponojn por fari devas sin turni kiel eble plej baldaŭ al S-ro Sergeant, ĝenerala sekretario, kiu raportos ilin.

Vortaro. — Por ebligi la vortaran taskon, ni petas al niaj anoj, ke, laŭ la tre bona metodo de la S. O., ili bonvolu ĉerpi el niaj artikoloj, en tiu jurnalo, la novajn jurajn vortojn, kaj skriki ilin kun la nacia traduko. Oni sendu la laboron al S-ro Degon, 17, rue St-Eloi, Douai (Francujo).

AL NIAJ LEGANTOJ

Pro la kongresfestoj, nia proksima Nº aperos la 10^{an} de Aŭgusto je ses paĝoj. La postproksima Nº enhavonta plenan raporton pri la kongreso aperos la 31^{an} de Aŭgusto.

⁂

Ni informas niajn agentojn kaj vendistojn, ke pro la gravaj malgajnoj kaj elspezoj, kiujn tiu faciligo kaŭzas al ni, ni de nun akceptos nur la *trionon* de la kondiĉe menditaj N^{oj} kiel *nevenditaj*.

Oni ofte petas nin pri alsendo de malnovaj N^{oj} kiel specimenoj, sed oni plej ofte pagas nek tiujn N^{ojn}, nek la poŝtelspezojn. Ni do de nun informas, ke ni sendos malnovajn N^{ojn} por la propagando je la prezo da 2 Sd. po numero, kontraŭ antaŭa pago. Ni ĉesigos la sendon de senpagaj specimenoj pli ol unuope menditaj.

ANONCETOJ

TARIFO

Korespondado. — Ĉiu enskribiĝo kostas 30 spesdekojn (fr. 0.75 ; 7 d. ; m. 0.60). Rabato da 25 % por 6 enpresoj kaj 50 % por 12 enpresoj. La literoj P I. montras la korespondadon per poŝtkartoj ilustritaj ; la litero L. montras korespondadon per leteroj ; la literoj P M. montras interŝanĝon de poŝtmarkoj. Niaj abonantoj rajtas enpresigi senpage sian nomon unufoje.

Petoj kaj proponoj.— Ĉiu linio (40 literoj) kostas 10 spesdekojn (fr. 0 25 ; 2 ½ d. ; m. 0.20). Rabato da 25 % por 6 enpresoj kaj 50 % por 12 enpresoj. Niaj abonantoj rajtas enpresigi senpage trilinian anonceton.

Komercaj reklamoj. — Ĉiu linio (40 literoj) kostas 16 spesdekojn (fr. 0.40 ; 4 d. ; m. 0.32). Rabato da 25 % por 6 enpresoj kaj 50 % por 12 enpresoj. Niaj abonantoj (speciale la hoteloj esperantistaj) rajtas enpresigi senpage trilinian anonceton.

NOTO. — Oni sendu ĉian anonceton antaŭ la 5^{a} kaj 20^{a} de ĉiu monato, ĉu al nia administrejo, ĉu al niaj lokaj agentoj aŭ al la Esperanto-Oficejoj. Oni skribu kiel eble plej legeble. Oni povas pagi per poŝtmandato, poŝtkuponoj internaciaj aŭ poŝtmarkoj. Ĉiu anonceto, ne akompanata de monsendo, ne estos enpresata. La Esperanto-Oficejoj estas petataj elmeti ĉiufoje niajn anoncetojn ĉe sia afiŝejo.

⁂

Korespondado

Roanne (Francujo). — Gefratoj Cortey, Marie kaj Benoit, 18-20 jaraj, 1, rue des Deux-Faubourgs. PI.

Chartres (Francujo). — S-roj Housseau, 37, rue de la Couronne. PI. ; Lhermitte, 21, rue St-Pierre. PI. ; Souazay, 13, rue du Petit-Beauvais. PI.

Leopold (Galicio-Aŭstrio). — S-ro K. Lewinski, Bonifratrow, 14 PI.

Auxerre (Francujo). — S-ro Ch. Bertheau, firmo, Soisson. PI.

Vratza-Pirdop (Bulgarujo). — S-ro Ivan H. Krestanof. PI PM. (esp. gazetoj).

Lyon (Francujo). — S-ro Pellet, instruisto, 83, rue Bossuet. PI.

Hénin-Liétard (P.-de-C., Francujo). — S-ro R. Legrand, 96, rue de Rouvraj. PI.

Douai (Nord - Francujo). — S-ro H. Coppin, 3, rue Cuvelle. PI. (nur kun fremd.).

Danzig-Langfuhr (Germanujo). — S-ro O. Emmert, Pommerschechaussee, 2 II. PI. L.

Aïdin (Azia-Turkujo). — S-ro M Assaf. PI PM.

Meaux (Francujo). — S-ro Goudailler, 5, rue St-Nicolas. PI.

Brenets-Locle (Svisujo). — S-ro F. Ducommun PI.

Roanne (Francujo). — F-ino Viala, instruistino, place du Marché PI.

Anvers (Belgujo). — S-ro H Braedt, rue de la Paix. 84, Berchem. PI ; S-ro Fr. Breedenraedt, Avenue Charlotte, 2 PI. ; S-ro H. de Keuckelaere, Avenue Isabelle, 5. PI. (de ĉefurboj).

Odense (Danujo). — S-ro E. Rasmussen, Odinsgade, 41. PM. ; S-ro L. Hausen, Oluf Bagersgade, 38. PI.

Verdun (Francujo). — S-ro Alfred d'Ourches, skulpisto, 91, rue d'Alsace-Lorraine. PI. L.

Lodz (Rusujo). — S-ro A. Küchler ; S-ro St. Karolczijk.

Zgierz (tr. Lodz-Rusujo).— S-ro St. Zgrgebuicki.

Horn (Aŭstrujo). — S-ro O. Braunecker, Horn 59 ĉe Dr B. (N. O.). PI. PM.

Petoj & proponoj

Konatiĝo. — Fremda Esp-isto deziras koni samideanojn en Salzkammergut, kiuj bonvolus skribi al ili: N. Mirošević, Ischl, Habsburgerstr. 3.

Informo.— La Krakovia Societo « Esperanto » ĉesigis siajn funkciojn dum la libertempo. Komunikajojn oni sendu al S-ro J. Goldman, Krakovio (Aŭstrujo - Plac Groble).

Ofico. — Mi bezonas helpprofesoron por kelkaj monatoj en Berlitz'a Lernejo. Por tio estas serĉata juna Esperantista, diplomita france kaj germane. Salajro 120 Sm. monato kaj loĝado ; en somero la salajro povus altiĝi ĝis 160 aŭ 200 Sm. Skribu al Paul Berthelot, 12, Avenue Koeller, Petropolis (Brazilujo).

Esperanto en la servo de la Dia regno. — Monata gazeto por kristanaj unuiĝoj. Ĉiu vera kristana Esperantisto bonvole mendu tiun ĉi gazeton : Paul Hübner, Mulhein-a/-Rhein (Germanujo) Jara abono : 50 Sd. — Oni postulu specimenon.

Amikejo. (Neŭtra Moresneto). — Charles Schwierer, oficejo por riprezentado loka de ĉiuspecaj komercajoj kun esperanta nomajo kaj esperanta librejo.

Bankistoj. — Intencantaj krei « Asocion Internacian de Bankistoj », ni petas ĉiujn bankdirektorojn, — oficistojn, ke ili sendu al ni sian aliĝon provizoran ; ni plezure kaj danke ricevos ĉian regularon pri ĝi. La Iniciatintoj : R Pillault, 10, rue Neuve, Clermont-Ferrand ; J. Pion, Société Générale, Beaune (Côte-d'Or), ambaŭ en Francujo.

Noto : La Esperantaj gazetoj bonvolu represi tiun alvokon.

Komercaj reklamoj

Faukner-Adresaro jus aperis kaj estas ricevebla por 20 Sd. afrankite. Redakcio de Faukner-Adresaro, Hostačov (Bohem.- Aŭstrio).

Franca-Brita Ekspozicio. — Pensio por gesinjoroj, Hejmaj komfortajoj. Bano. Moderaj prezoj. Oni parolas Esperante, Angle, France. S-ino O'Connor, Esperanto-House, 17, St Stephens Sq. Bayswater-London (Anglujo).

Reklamo, — S-ro C.-A.-G. Browne, reklamagento, 53-54, Wych-Street, London, W. C. (Anglujo), deziras korespondi kun Esperantistoj pri anoncado en britaj, koloniaj kaj fremdaj jurnaloj.

Silkaj Esperantaj flagetoj. — Taŭgegaj varbiloj kaj propagandiloj uzeblaj por ornamado de Esp festsalonoj Amplekso : 11/16 cent. Prezo : 12 Sd. unu. Speciala rabato al la grupoj kaj Esp.-Oficejoj por mendo de 50 ekz. Haveblaj ĉe S-ro B. Peyraud, 41, rue de la Loire, St-Etienne (Francujo).

Fianĉinoj esperantistaj. — Aĉetu viajn litoblankajojn en tolo kaj kotono, servietojn, tablotukojn, k. t. p, ĉe via samideano Jakobo Wyler, Zurich (Svisujo), Stampfenbachstr, 32. Belaj, bonaj kvalitoj ; moderaj prezoj ; postulu specimenojn aŭ viziton.

Dresdeno

Kongresurbo 1908 en Germanujo

M. TESSNER, librovendejo

Ammonstrato, 63 (proksime de l'ĉefstacidomo)

Vendas ĉiajn Esperantajn kaj Germanajn librojn ĉien en la tuta mondo

Rubandoj

Speciala fabrikejo por rubandoj, ordenaj bandoj francaj kaj fremdaj. Liveranto al la ministrejoj.

Laŭ mendo la firmo povas fabriki kiajn ajn rubandojn por industristoj kaj komercistoj, bandojn por ordenitoj, insignojn por societoj, kongresajn framasonajn rubandojn. Speciala banto por la Esperantistoj.

Louis Reynaud

18 et 20, place Jacquard, St-Etienne (Loire) *France.*

TOBLER'A

Bonega Svisa Lakta Ĉokolado

★ *Espero* ★

kun Esperanto-Jurnalo ilustrita,

ĉie aĉetebla

ESPERANTISTA HOTELO

Marigny

S^{INO} BOCQUILLON

11, Rue de l'Arcade (VIIIe) — ***Paris***

(apud la preĝejo « *La Madeleine* » inter la stacidomoj *St-Lazare, Orsay,* kaj la promenejo « *Champs-Elysées* »

English spoken. — Man spricht deutsch.

Moderna komforto — Banĉambro

Elektra lumo — Telefono (242-31)

Rekomendata.

Liverantoj de Mustardo **kaj Amelo al la Reĝo**

Laŭ privilegio

J. & J. COLMAN

(Akcia Societo)

MANUFAKTURISTOJ DE

MUSTARDO, AMELO, BLUIGAĴO

KAJ

BRITA RIZFARUNO

108, CANNON STREET, LONDON

kaj CARROW WORKS, NORWICH (Anglolando).

LA SOLE INTERNACIA SIGNO

estas la **„ VERDA STELO " GASSE**

la plej malnova — la plej malkara — la plej bela

1 pinglo aŭ broĉo fr. 0,75 (sm 0,30) ; 10 = fr. 6 (sm 2,34). 1 kravata pingleto fr. 0,75 (sm 0.30), 10 = fr. 4 (sm 1,59)

en **Francujo** : Emilo Gasse 77, rue Ernest Renan, Havro.

Belgujo : ĉe Sro J Coox, Belga Sonórilo.

Germanujo : Esperanto Verlag Möller et Borel, Berlin S. 42.

Rusujo : Sto Espero, B. Podjaĉevskaja, Nº 24, Kv. 12. St. Peterburgo.

Svedujo : Esperantisten, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm.

Svisujo : Sro Karl Jost. 40. Frölichstrasse Zürich.

LA PATRINO

de **Ernst ZAHN**

(trad. J. Ŝmid, Bern).

La manĝo finas kaj Lene forportas la stanajn telerojn. La glasoj restadas antaŭ le gepatroj kaj la filo. Super ili la lampo brulas ĉe la plafono. Sed ili sidadas kun brakoj larĝe apogitaj, tiamaniere ke ĉiu ĵetas sian pezan ombron sur la tablon. Georg demetis sian jakon. La manikoj de lia ĉemizo, desegnita per ruĝaj streketoj, forte diferenciĝas je la malhela veŝto kaj streĉite ĉirkaŭas liajn fortajn brakojn. Kiam li okaze ekvidas sian muskolozan brakon, tiu ĉi lin mem surprizas, ĉar li tuj poste diras : « Jes, kreskinta mi estas kaj ŝtalo enfluis en miajn membrojn. Nun mi riskus kontraŭstaron je vi, patro, se vi volus bati min. »

Dum tiu ĉi, kun laŭta ekridego parolita diro, kiu devus esti kzazaŭ ŝerco, li laŭlonge lasas fali la dekstran manon sur la tablon kaj kurbas la mezfingron de l'mano simile al hoko. « Enhokiĝu nur, vi ! » li postulas al la patro. Tobias ne bone scias kiel li devas kompreni la vortojn ; sed li estas tro bonhumora por ne interkonsenti ŝercon, kaj ankaŭ ĉiam estas iom fiera pro iama forteco. Tial lia brako malrapide alproksimiĝas tiun de lia filo kaj lia fingro enhokiĝas je la alia. Nun ili komencas tiri. La muskoloj de iliaj brakoj streĉiĝas, ŝvelas, la ŝultroj ektremas, la sango superfluas en iliajn vizaĝojn. Momenton neniu el la du pugnoj faras plej malgrandan ekpuŝon. Poste la brako de Tobias komencas tremi, Georg tiras. Peze, kiel granda ŝtono, la griza mano de l'patro cedas iomete, denove iome. Per malrapida, maldelikata perforto la junulo venkas la forton de l'patro. En la stubo estas mallaŭto. Balbino apogis sin malantaŭen sur sia seĝo jam kiam Georg diris la strangan vorton, ke li ne plu lasas sin bati ; ŝi ne parolas, rigardas neniun el la du viroj, klinas la kapon antaŭen, kvazaŭ ŝi pripensas, kaj ŝia vakspala vizaĝo estas strange rigida. Sed Lene envenis kaj estas tiel surprizigita pro la fortprovo de ambaŭ viroj, ke ŝi ne moviĝas. Nun ekspiregas la patro, nun li cedas. Georg tiregas, ĉar la kontraŭstaro subite ĉesas, la brakon de l'patro tute al si. « Haha », li ekridas, « ĉu vi vidas nun ? »

La maljunulo estas pala. « Oni do ne plu estas juna », li diras spiregante. Per la libera, pro la penado necertigita mano, li ekprenas embarasete la flavblankan longan barbon. Nur nun Balbino ree rigardas sian filon ; ŝi pririgardas lin silente, akre, per iom da suspekto sed ankaŭ per kvazaŭ sekreta minaco : « Do ne kredu, ke oni timas vin ! Kun multaj mi riskis fortprovon, transe en Ameriko », diras Georg, agrablakontente etendiĝante sur la seĝo. La venko ŝajnas plaĉi al li. Pli aminda homo, ol kia li alvenis, li fariĝis. Li prenas la glason kaj ekpuŝas kun la patro : « Je gaja kunvivo », li diras, forpelas per la bona vorto malagrablan senton el lia patro kaj babilante tenas la glason ankaŭ al la patrino, ĝis kiam ŝi malfrue ankaŭ kuntrinkas. Kiam Georg nenion plu scias rakonti, la gepatroj komencas : pri feliĉo kaj malsukceso, pri la malfeliĉo, la morto de Antono, pri la perdo de l'patrino de Lene ! Ke fariĝis mallaŭta en la domo, diras Balbino, kaj ke por la patro la laboro ofte fariĝas tro peza. Kiam ŝi komencas paroli pri la patro, ŝia edzo, ŝi duone turnas sin kontraŭ Tobias, kiu ĵus denove malrapide kaj memkontente plenigas sian pipon ; ŝia vizaĝo ne ŝanĝiĝas, ĝi ne montras ian ameman mienon. « La patro ĉiam restis egala », ŝi rakontas. « Diversajn altrangojn oni al li proponis. Vilaĝestron oni volis fari, ankaŭ en la landkonsilantaron ili intencis elekti lin, sed li ne ŝatis. Li ne amas ŝajnigi sin, sed resti tia kiel ĉiam. » Tia estas bone pripensita parolo, kvazaŭ humiliga respondo, al la fierkonduto de Georg, estas kvazaŭ Balbino propramane deprenas la ĉapelon de sur lia kapo : « Deprenu ĝin pro la estiminda homo, via patro ! »

Georg nur duone aŭskultis. Li klinas la kapon pri tio, kion diris la patrino ; sed dume li apogas sian kapon sur la dekstra mano kaj ruze okulumas al Lene, kiu alproksimiĝas al Tobia :

« Mi iras dormi », diras la knabino al sia avo.

« Bonan nokton », diras tiu ĉi.

Lene ankaŭ salutas : « Bonan nokton al ĉiuj. » Per scivolema okulo ŝi dume ankoraŭ unufojon ekrigardas en la vizaĝon de Georg kaj miras, kiel tiu ĉi fiksas ŝin per siaj malsekbrilaj okuloj, ekruĝiĝas pro lia rigardo kaj iras.

« Sufiĉe dormi ŝi almenaŭ povos », diras Georg iom malkontente, kiam ŝi eliras la stubon. Lia okulo sekvis ŝin, restadis sur ŝi kaj atentis pri ĉiu linio de ŝia juna korpo. Eĉ de la pordo, per kiu ŝi eliris, lia rigardo nur malrapide sin detiras.

« La tro longa restado sen dormo ne estas bona por ŝi », Balbino diras. Dume ŝi renkontas la okulojn de Georg. Kaj ree ŝi akre rigardadas lin. Kiam Georg denove fariĝas babilema kaj komencas rakonti, ke oni en Ameriko ne ŝatas kuŝiĝi frutempe, ŝi forte kunpremas la lipojn kaj respondas lian demandon nur per kapkliniĝo.

Entute ilia vespero pli trankvile pasas ol ili opiniis.

« Kion vi pensas pri li ? » diras la patro al sia edzino, kiam ili eniris sian dormoĉambron.

« Espereble li komencos bone », ŝi respondas per rigida kaj seka maniero. Sed la edzo kontentiĝas kun tio. Balbino ĉiam estas malbabilema. Li ne pensas alie kiam lia edzino poste ree eliras kaj longtempe ne revenas ; eble ŝi memoras pri ia farota laboro.

Sed Balbino ne laboras. Sen bone scii kion ŝi volas, ŝi reiris en la stubon, tiam en la koridoron kaj fine antaŭ la domon, kie la lunlumo trankvile kuŝas super la ĝardeno, la griza strato, la vilaĝo kaj la montoj. La manojn sur dorso, ŝi faras kelkaj paŝojn en la ĝardenon, turnas sin kaj rigardas supren al la fenestro, post kiu Georg dormas en sia ĉambro. Dormi li jam devas, ĉar en la ĉambro ne plu estas lumo ; nur la luno ĵetas sian brilon ankaŭ al tiu ĉi vitro, ke brulas en la malnova fenestro kvazaŭ blankblua flamo. Alte kaj rekte Balbino tie staradas ; ŝi vidas la filon antaŭ ŝi, kvazaŭ ŝi efektive rigardus supre tra la fenestro al li. Ĉiuj ŝiaj pensoj sin okupas je li. Tia li estas en ŝia memoro ! Tia li iam estis ! Tia li estas nun ! Ĉiujn moviĝon kaj mienon ŝi memoras. Kaj ŝi pripensas : Ne ĉio estas kiel ŝi esperis ! Poste ŝi prezentas al si kiel li nun dormas, la unuan nokton ree sub la hejma tegmento ! Subite io kvazaŭ altiĝanta akvo ekbolas. La ideoj en ŝi miksas, kaj la tempo denove revenas, kiam la *malgranda* Georg dormis sub tiu ĉi tegmento ! ŝi apenaŭ moviĝas, la manojn sur dorso ŝi tie staras. Georg estas la sola, kiu al ŝi restis, estas la ŝtono, sur kiu la domo estonte staru ! Denove ekbolegas en ŝi. La penso, ke la filo ne tia estas kia ŝi esperis, perdiĝas pro la alia, ke li estas tie ĉi, tiu kiu iam en tiu ĉi sama domo kuŝis en lulilo, malgranda senkonscia homo, senkulpa, esperdona ; ŝi ĝojas, ĝojas posedi denove tiun, kiu dormas supre post la fenestro ! ĉio ja povas fariĝi bona kun li !

(*Daŭrigota*).

Pres. Ch. Zœllner, Genève